

Dmitrij Ševčenko
Anna Striganova

**La tero,
kiu volis
forflugi**





ĈIELARKA NEBULO

Dmitrij Ŝevĉenko
Anna Striganova

LA TERO, KIU VOLIS FORFLUGI

**Fabela
novelo**

Eldonejo
Impeto

Moskvo

Eldonejo «Impeto»

2009

УДК 811.922
ББК 84Р7-4Эсп
III37

E-mail: impeto@impeto.ru

Ретејо: www.impeto.trovu.com

ISBN 978-5-7161-0197-5

© Dmitrij Ševčenko 2009
© Anna Striganova, 2009
© «Impeto», 2009



ĈAPITRO 1

Vaganto

Komence sur la teron falis paro da pezaj gutoj, poste — ankoraŭ kelkaj. Poste la pluvo transformiĝis je vera pluvego, kaj la lacigitaj de la taga varmego arboj etendis siajn mincajn branĉetojn supren, por pli rapide akcepti kelkajn freŝigajn gutojn. Kaj poste, eksentinte, ke tiu ĉi peza varmega tago finiĝas, ekdormetis, lacaj, ĉe la pado. Satigita de la varmego, la tero elspiradis bluetan vaporon, saturitan de la humidaj gutoj, la vaporo sorĉe briletis. Kaj sur la tero iĝis preskaŭ mallume, kvazaŭ la suno dum kelkaj sekundoj glitis de la ĉielo.

Kaj venis la nokto.

Nenio mirinda, someraj sunsubiroj eĉ en la suna vetero estingiĝas sufiĉe rapide.

Li jam delonge estis iranta, ne deturniĝante, tra la bosko, kie, komfortiĝinte, dormis lacaj arbustoj kun sovaĝaj framboj, tra la kampo, kie malhelflava sekalo brakumadis lin je talio. Li iris tie, iom levinte la brakojn, tuŝadis per la polmoj pintojn de la altaj spikoj, kaj tiuj responde kviete eklumis, samkiel kutime lumas sekalo sub radioj de la somera suno. Li tuttempe iom ridetis, per stranga kaj fora rideto, kaj la pluvgutoj, apenaŭ tuŝinte lian volvitan en la mantelon figuron, transformiĝis je blueta vaporo. Do li iris tiel, ĉirkaŭita de vapora nebulo, rekten kaj rekten.

Poste li ekdeziris ripozi. Lin ĉirkaŭis kampo — kampo de malsekaj oraj spikoj. Flanke — tri ventmueliloj sur altaj rustaj fostoj. Sub ili — eta forlasita dometo kun turo, cikonia nesto sur la rompita kaj malheliĝinta pro tempo tegola tegmento. Apudas maljuna, eĉ antikva kverko kun arĝenta korko. Iam ĝin trafis fulmo, kaj nun ĉe unu ĝia flanko sonoras subpluve pezaj malhelaj folioj, ĉe la alia estas iom timigaj, nudaj, mortaj branĉoj. Sed sur ili, agrable knarante, sur du rustaj ĉenoj skuiĝetas simpla ligna balancilo. Kaj ties knaro nebule, apenaŭ kapteble memorigas tiom bone kaj strange ekde infaneco konatan sonon — knaron de malnova pordo en la minuto, kiam

post longa vojaĝo ni revenas hejmen. Li malleviĝis sur la balancilon, prenis el la poŝo eluzitan buŝharmonikon. Iom raŭka senakorda melodio mirinde kuniĝis kun knaro de la rustaj ĉenoj, kun susuro de la vente movigataj mueliloj.

Tiun iom strangan, sed tamen, harmonion, rompis knaro de la ovriĝinta pordo. El la domo, peze spirante kaj lamante je unu piedo, eliris granda hundo kun kruda griza, kaj kelkloke eĉ tute senkoloriĝinta hararo. Post ĝi aperis knabino en leĝera, malseka, — ankaŭ ŝi trafis subpluven — hela robo. Ŝi ektemis, samkiel ekstremus ajna knabino, ekvidinte nekonaton en longa griza mantelo. Sed ŝi ne ekintencis forkuri, kiel ne ekintencus forkuri iu ajn infano. Ĉiuj infanoj ŝatas vagantojn. Kaj ĉiuj infanoj sentas paŝojn de proksimiĝanta miraklo. Kaj tiutempe la hundo ĝislamiris la balancilon kaj ĝoje, kiel scipovas nur la plej bonaj hundoj, jelpetante, prezentis al la manoj de la nekonato sian grizan muzelon kaj varman sekan nigran nazon.

Sekala spiko iom kliniĝis kaj flustris ion al malhelblua cejano, tiu transdonis la vortojn al diafane-ruĝa papavo. Kaj tiel, unu post la alia, ili venigis al la staranta sur malhela peroneto knabino peceton de blueta nebulo — la vortojn, kiuj ne estas en vortaroj, kiujn scias nur bestoj,

infanoj kaj floroj, la vortojn, kiuj iel subite redonas al la homoj ŝtelitan de la tumulto animon. La knabino, ne plu hezitante, kuris al la balancilo, ĵetis kaptukon sur la malsekan teron kaj sidiĝis sur ĝin, rekte antaŭ la nekonato.

— Mi estas Lena.

— Mi estas Solel, — la vaganto demetis la kapuĉon.

— Stranga nomo.

— Unu el multaj, mi havas multajn nomojn, ĉiuj vagantoj havas multajn nomojn... Kaj multajn animojn.

— Por kio? — La knabino scivoleme rigardis al li.

— Por ke ĉiam sufiĉu fortoj foriri, kiam tempas foriri.

Post momenta silento denove eksonis la muziko de la buŝharmoniko. Nun iom aliel, aŭ simple finiĝis pluvo kaj ĉesis vento. La knabino plukis kreskantajn ĉirkaŭe cejanojn, papavojn kaj sekalajn spikojn kaj plektis el ili kronon. Plektu kronon, lasu ĝin en la akvon... La legendo malnova, kiel la mondo. Malsekaj florpetaloj senforte velkis, volviĝante. Tiam la harmoniko eksilentis por momento, kaj Solel etendis al la krono mincajn fortajn fingrojn. Samkiel antaŭe la spikoj, la floroj etendiĝis al lia mano, reviviĝis kaj kvazaŭ iom eklumis deinterne.

— Vi estas sorĉisto, ĉu?

La vento movis brilajn foliojn, kaj granda guto glite falis sur la grizan dorson de la maljuna hundo. Tiu saltleviĝis kaj ofendite skuiĝis.

— Mi estas simpla vaganto, multon vidis, jen ĉio. Kaj ĝenerale, ĉiu kapablas igi ies animon lumi, speciale, se tio estas la animo de eta floro.

Responde la knabino ridetis kaj tuŝis per polmo la kreskantajn apude florojn. De unu el ili sur ŝian manon falis peza pro la pluvo papilio. Kaj jen ĝi jam heziteme ordigas la flugilojn: ĉu vere ĝi jam sekiĝis kaj saviĝis? Kaj ankaŭ ĝi kviete eklumas.

Kaj la pluvo jam intertempe finiĝis, kaj nepenetrebila mallumo de la malserena somera vespero ĉirkaŭis ilin. Nur apenaŭ rimarkebla, iom simila al nebulo oranĝ-ora lumo ĉirkaŭas la vaganton, knabinon, papilion, florojn, domon kaj maljunan kverkon. La lumo kviete leviĝas al pintoj de mueliloj, falante sur iliajn alojn kiel rufa roso, ĉirkaŭas la tutan terpeceton per ia kortuŝa, preskaŭ netera komforto, iganta por sincera konversacio:

— Mi konstante venadas ĉi tien ne sciante por kio. La domo estas jam malnova, interne restis nur forno, kaj ankaŭ ĝin jam ne eblas hejti, la tubo ŝtopiĝis kaj ne lasas la fumon eksteren.

La vortoj de Lena estas akompanataj de la buŝharmonika muziko, nun ĝi sonas glate kaj melodie, kvankam tute mallaŭte.

— Ni ĉi tie iam loĝis, kiam mi estis tute malgranda. Kaj nun ni loĝas jen tie, kie estas lumoj, ĉu vi vidas? — ŝi montris al la urbo, pace ekdormanta ĉe la horizonto. — Tie estas novaj blankaj mueliloj, kaj ankaŭ la domoj tute novaj... Sed mi daŭre venadas ĉi tien, sidas longe-longe. Ĉiuj, kiujn mi konas, flanke ĉirkaŭiras tiun ĉi lokon, ili diras, ke ĉi tie estas malkomforte, kaj ĉiam, kiam ili venas, ilin kaptas sopiro. Ankaŭ mi ĉi tie sopiras, sed al mi ĉiam ŝajnas, kvazaŭ tiu ĉi domo, maljuna kverko, muelilo kaj knaranta balancilo volas ion rakonti al mi.

Melodio de la buŝharmoniko iĝas pli kaj pli laŭta kaj maltrankvila, kaj la okuloj de la vaganto streĉe fiksrigardas la ĉirkaŭitan de rufa lumo-nebulo terpeceton.

— Vidu, la kverko mallevas la branĉojn, etendas al mi siajn foliojn, kaj mi emas etendi la manon kaj karesi ilin. Kaj ĝi atendas, ĝi volas ion rakonti, sed mi ne aŭdas, ne komprenas. La mueliloj malstreĉiĝis kaj rotacias tiom forte, ke ŝajnas, ke tiu ĉi terpeceto jen-jen liberiĝos, leviĝos kaj forflugos...

La vaganto forprenis de la lipoj la harmonikon, karesis malsekan hararon de la ekdormanta hundo kaj, ridetinte (la lumo-nebulo tiusekunde ekbrilis iom pli klare), elparolis:

— Kaj tio efektive estus nemalbone, en vian bukloharan kapon venis sufiĉe bela ideo.

— Nun jam ne gravas, ĉion ĉi oni baldaŭ detruos, kiel oni kutime detruas malnovajn domojn, kaj la kverkon forhakos, por ke ĝin ne trafu ankoraŭ unu fulmo. Kaj mi neniam ekscios, kion tiu ĉi tero volis al mi rakonti. Tamen fojfoje ankaŭ mi, samkiel ĝi, volas forflugi...

La vaganto sonigas ankoraŭ kelkajn notojn per sia harmoniko. Nun tiu mirakla sono jam tute similas venton.

— Vidu, Lena, en la mondo ekzistas la momentoj, kiujn efektive indas travivi, pro kiuj nenion endas domaĝi. Kaj do, kiam tia momento venas al ni, tuŝas nian sorton, transformante ĝin por ĉiam, ni ĉiufoje eksentas tiun, ekde infaneco konatan, strangan deziron, — forflugi. Kaj diference de mi kaj vi, tiu ĉi tero jam travivis ĉion, kion indas travivi. Kaj nenio vere rimarkinda ripetigaĝas dufoje. Tial ĉi tie estas tiom netolereble triste kaj tiom mirinde bone. Kaj tio ne ŝanĝiĝos pro tio, ke la homoj ruinigos

la domon aŭ forhakos la arbon, detruu la memoron povas neniu. Tial, kiel vi mirinde ĝuste rimarkis, por tiu ĉi tero tempos forflugi.

— Bedaŭrinde, ke tio ne eblas, samkiel ne eblas ekaŭdi tion, kion la tero tiom volas diri al mi.

— Nu, ĝuste tio tute ne malfacilas. Tuŝu la ombron de la kverko, aŭskultu flugon de papilio, rigardu la venton, movantan la muelilojn. Nur tiel, ke vi per la tuta mano sentu ombron, por vi, kiel muzikon, aŭdu flugon, por vi, kiel mian vizaĝon, vidu venton. Kaj imagu, ke tio estas sonĝo, nur tia sonĝo, kiu estas pli reala ol la tuta ekzistanta en la mondo realo.

Solel metas la buŝharmonikon al la lipoj, kaj la rufa lumo, kiu kutime estas plej ordinara, ĉi tie, meze de la nokta kampo, subite iĝas plej fabela en la mondo suna lumo.

ĈAPITRO 2

Melodio de Naskiĝo

La harmoniko sonas enigme, ĝoje, pure. En ĝi aŭdeblas kiel gutas akvo, kiel blovas vento. Kaj por sekundo al Lena ŝajnas, ke en la mondo estis ankoraŭ nenio, ke ĝi ĵus-ĵus naskiĝis. Kaj jen ŝi jam rimarkas, kiel ĉio malaperas sur tiu tero, kiu volis forflugi. Restas nur la malpleno, senkolora, senfina. Kaj ie en ĝi io subite eksplodis, miriadoj da steloj leviĝis el ĝi, ili rondodancis, trembrilis en la novnaskita ĉielo. Poste eksonoris la herbaro, sukoplenaj ŝosoj ĝoje etendiĝis supren, junaj arboj leviĝis el la tero ordigante gluecajn folietojn, kaj la Universo mirigita rigardis al ili, ankoraŭ ne komprenante, ke en la mondo nun ekzistas la vivo. Sed Lena ne vidis la

Universon, antaŭ ŝi estis nur lumigita verda herbejpeceto kaj tre juna, svelta, sed tamen tiom konata por ŝi kverko. Ĝi naskiĝis en tiu tago, kiam naskiĝis la Universo, kaj nun Lena sciis, kial ĝi volis tiom multe rakonti al ŝi.

— Kiel do vi tie fartas, sur la tero? — la stelo sonorvoĉe adresis la kverkon.

— La herbaro aromas tre bele, kaj de la vento venas al la korko agrablaodoro. Kion vi pensas, kio ĝi estas?

— Oni diras, tio estas vivo.

— Ĉu ankaŭ tie, ĉe vi, estas vivo?

— Verŝajne! Ni ĉiam flugas, flirtas kaj rondodancas. Sed kio do al vi okazis? Viaj folioj estis tiom verdaj, sed nun — tuttute oraj.

— Kaj envere, kio al vi okazis? — el sub la radikoj de la arbo rampis stranga estaĵo — du manoj, du piedoj, longa kvasteca vosto, hararo sur dorso kaj grandegaj, iom lanugecaj oreloj. Ĝi estis elfo, unu el spiritoj de la naturo, naskitaj en la plej unua tago.

La kverko rigardis al siaj branĉoj kaj ne komprenis, ĉu ĉagreni aŭ ĝoji pro la nova vesto.

— Tio estas tempo, — sufloris la Universo.

— Kaj la tempo, kio ĝi estas?

— Kaj la tempo estas tio, kio foje ĉesigos tion, kio komenciĝis hodiaŭ, la tutan sensencan feston de koloroj, odoroj kaj vivoj.

Pro la malbela sibla voĉo ĉiujn ĉeestantojn trafis stranga frido. La voĉo apartenis al kurbiĝinta estaĵo, sidanta en la plej densa ombro kaj montranta el-de tie siajn akrajn, nigrajn dentojn.

— Kaj por ke vi ne forgesu pri tio, ke vi ĉiuj revenos en la Malplenen, hodiaŭ naskiĝis ankaŭ mi, kaj mi ne plu malaperos. Se vi bonvolos min voki, nomu Koŝmaro.

La kverko ofendite deturniĝis de la fia estaĵo kaj, kun abomeno volvinte ĝin per siaj branĉoj, forĵetis ĝin post la horizonton.

— Jen al ĝi, — ĝoje ekridis la steloj. — Ni ne kredas je Malpleno!

— Ne kredas, ne kredas! — dancetis la elfo.

— Ne kredas, — susuris la juna kverko per siaj denove verdaj branĉoj.

Kaj nur la Universo pormomente iĝis malgaja, al ĝi ne plaĉis tiuj senzorgaj estaĵoj, ridantaj al la apenaŭ aperinta en la mondo vivo. Sed ĝi vidis, kiel elfore rikanis Koŝmaro, kiel karesemis, prilekante ĝin per sia glueca nigra lango, la Malpleno, kiel el la Malpleno

eliris ankoraŭ iu, al kiu eĉ la Universo mem ne kuraĝis rigardi.

— Hej, aŭskultu, — la kverko denove etendis al la ĉielo la branĉojn, ree orajn.

La steloj ĉesis sonori kaj danci, kaj, iom malleviĝinte, aŭskultis.

— Kaj ni kreu la mondon!

— Ni kreu, ni kreu, — ĉiuj eksaltis, aplaŭdante per diverskoloraj manplatoj.

La steloj malleviĝis al la branĉoj de la kverko, la elfo grimpis al ĝia pinto, kaj ili flustre ekdiskutis. Kaj tiam sur la malseka verda tero ekbrilis rojetoj, ekflamis kiel miloj da steloj ruĝaj papavoj, blujaj cejanoj kaj ankoraŭ delikataj, violkoloraj kampanuloj. Kaj sur la blua ĉielo ekbrilis ĉielarko, ekfloris molaj komfortaj nuboj. Kaj ĉio, kio estis aperanta en la mondo, kiu nun estis konsiderebla kiel kreita, alrampadis kaj alkuradis al la kverko, elpensante kaj kreante juvelŝtonojn en tera sino, bestojn, dolĉajn berojn kaj somerajn krepuskojn.

La Universo observis ilian infanan ĝojon kaj preskaŭ sukcesis forgesi pri la provizore kaŝinta sin Malpleno.

La kverko gastame proponis sian branĉon al la alfluginta turdo. La turdo lokiĝis komforte, kaŝis la

kapon en plumoj kaj ekdormis. Samsekunde sur la glatan trunkon suprengrimpis sovaĝa kato, ĝi muĝetis kaj lekis la lipojn... Dummomente de la turdo restis nur plumoj. La kverko kun abomeno deskuis la katon. Kaj la tuta novnaskita mondo eksilentis. La nuboj griziĝis kaj ekploris.

— Ĉu ankaŭ tion kreis ni? — sonore kaj treege ĉagrenite demandis la stelo.

— Jes, verŝajne — la kverko suspiris kaj mallevis la branĉojn. — Kaj, ŝajne, ekde nun ni ĉiam penados kompreni tion, kion ni kreis...

Melodio de la buŝharmoniko ĉesis. Antaŭ Lena denove estis la domo, mueliloj, maljuna kverko.

— Solel, — ŝi returniĝis. — Ĉu tio estis la unua tago de la tero?

— Jes.

— Sed kiun ekvidis la Universo apud la Malpleno kaj Koŝmaro?

— Morton.

— Ĉu efektive vi estis tie tiam, Solel, se vi tiel bone scias?

— Ne gravas, ĉu mi estis aŭ ne. Mi estas vaganto, kaj ĉiu vaganto nepre devas porti en la koro la unuan tagon de la mondo. Por ne forgesi la simplan, primitivan, knaran, la plej belan en la mondo melodion de la vivo... Rigardu plu: la tero, kiu volas forflugi, ankoraŭ multon devas rakonti al vi.

ĈAPITRO 3

Melodio de Espero

Ankoraŭ sonas la harmonika melodio de la komenco, ĝiaj simplaj, sonoraj, puraj notoj, sed jen jam ĝin aliĝas io nova — rapida, emociiga motivo. En ĝi sonas bruego de falantaj ŝtonoj, kraketado de fajro, en ĝi sonas la unua en la mondo kanto.

La domo kaj mueliloj denove malaperis, antaŭ la okuloj de Lena sin prezentis la novnaskita mondo. Iom pli alta iĝis la herbaro, iom malpli helaj kaj travideblaj ŝajnis floroj, sed tamen tio estis ankoraŭ la sama, naiva, strebanta simple vivi mondo, akre blua ĉielo, smeralda herbaro, kaj en ĉiu folieto, interbabilante, ludis kurludon sunleporetoj.

— Hej, rigardu, — la elfo elŝovas el la trunkokavo harozan orelon, poste — longan brilan nazon.

Responde la kverko pigre turniĝas, peze knarante per branĉoj. Ĝi jam ne estas tiom lerta kaj juna, kiel antaŭe, ĝia voĉo sonas mallaŭte, penseme:

— Kien rigardi, eta frato? Mi vidas nur venton kaj iun beston, kaŝirantan en la herbaro kaj gvatantan alian beston.

— Tiu unua estas homo. Amuza estaĵo. Imagu, ĝi ne nur ĉasadas, kiel ĉiuj decaj bestoj, sed tuttempe ĉizadas sur la rokoj iujn desegnaĵojn, ellernis paroli... Ĝi nomas min kaj vin kaj multajn aliajn dioj kaj persiste pensas, ke ĝi vivas por nia honoro.

— Eble, ankaŭ tio estas vero, — filozofie suspiris la kverko, — ja ni nenion scias.

— Vi iĝis tro moroza, — la elfo ofendite movis la orelojn. — Sed mi volis rakonti al vi pri unu interesa observaĵo. Ĉiuj bestoj eliradas el siaj kavoj nur nokte, timas. Sed tiu eliris dum la luma tago. Ne gravas, mi prefere iru dormi, evidentas, vi ne havas bonhumoron hodiaŭ.

Kaj la elfo saltis reen en la trunkokavon.

Tiutempe ankaŭ Lena ekvidis inter herbaro la homon. La homo estis sin volvinta en peltan felon kaj tenis en la manoj bastonon kun akra pinto — lancon. Ekblovis la vento, aro da timigitaj birdoj eksoris ĉielen. La homo, lerte saltinte, sendis la lancon al ili.

Post kelkaj minutoj li jam frotis unu kontraŭ la alia duon da ŝtonoj, penante akiri fajron kaj ne rimarkante, kiel scivoleme observas lin la elfo, ŝovinta el la trunkokavo sian nazon. Kiam la fajro ekardis, kaj la grasa birdo ekkovriĝis per bruna krusteto, la homo leviĝis kaj elparolis:

— Mi dankas vin, ho potenca tondrodio, pro tio, ke vi donacis al mi fajron.

— Homo... — la kverko peze knaris, sin klinante super la fajro, por pli bone vidi.

Ankaŭ Lena fiksrigardis pli atente. La homo estis fortika kaj juna, kun sunbruniĝinta vizaĝo, kun simpla, sed tre vigla, arda rigardo. Li gaje kaj kuraĝe sin turnis flanken al la kverko.

— Jes, dio de arbo, mi estas homo. Kaj mi ne plu timas paroli pri tio eĉ tage. Mi havas lancon kaj fajron, kaj krome mi scipovas ensorĉi venton.

— Interese... — la kverko movis pezajn branĉojn. —
Interese. Kaj eble, vi, homo, scias ion pri la mondo.

— Certe. Jen tiu birdo estas mia predo. Ĝi havas
bongustan, sukoplenan viandon.

— Mi gustumos, kun via permeso, — la elfo etendis
etan maneton al la fajro, sed tuje sin brulvundis kaj kun
lamentita ofendita ekjelpo sin kaŝis en korkaj sulkoj.

— Ĝi estas varmega, ĉu? — la homo ekridis el la
tuta animo. — La predo povas esti seka, sed povas esti
grasa, kaj ju pli bonan predon mi alportos, des pli bona
ĉasisto mi estos konsiderata. Kiam la ĉefuloj konsideros,
ke mi estas sufiĉe bona ĉasisto, okazos la festo de inico.
Poste mi trovos al mi edzinon, aŭ multajn edzinojn, kaj
mi havos infanojn. Jen ĝi — la mondo. Mi ĝin konas.

— Efektive, — la elfo finfine sukcesis deŝiri por si
viandpeceton kaj nun appetite maĉis ĝin, etendiĝinte sur la
herbaro. — La viando estas bongusta, kaj la homoj havas
belajn edzinojn. Ĉu, eble, ĝuste tio estas mondo?

— Sed kion vi volas, homo? — la voĉo de la kverko
iĝis pli kaj pli pensema.

— Mi volas, ke la plej belajn edzinojn havu mi, kaj
ke la plej bonan en la mondo predon trafu mia lanco. Kaj

por ke miaj malamikoj tremegu, aŭdante mian nomon, kaj... — la homo eksilentis, ekpensinte pri io.

— Kaj? — la elfo prilekis siajn etajn fingrojn kaj ŝmacis per lipoj.

— Kaj neniam morti, — elspiris la homo.

— Li prononcis tion, prononcis, — la frido momente plenigis la aeron, rande de la arbarkampeto frotis siajn glitajn piedaĉojn Koŝmaro. — Nun do mi scias, kion vi timis, kial ne eliradis tage el sia loĝujo.

Trisalte Koŝmaro atingis la homon, sed la kverko kovris lin per siaj pezaj branĉoj.

— Mi eliris el la kaverno tage, ĉar mi nun havas tion, per kio mi povas venki vin, — kaj kun besta lerto la homo eltiris el la peltofaldoj aĵon, fore memorigantan trumpeton. Simpla, misa melodio, naiva, gracila, enfluis la muzikon de la harmoniko de Solel per nova noto, kaj tiu nova noto donis fortojn, donis kuraĝon rigardi al la rikananta muzelo de Koŝmaro kaj ne deturni la okulojn.

Koŝmaro kovris la orelojn per piedoj kaj, ne perdante sian degnon, lante malaperis en la herbaro.

— Sed ja la povra homo tutegale mortos, ili ĉiuj mortadas, — flustris la elfo, viŝante la larmojn je kruda korko de la kverko.

— Sed li verkis kanton. Ĉu vi memoras, kiel ni kreis la mondon? Ja tio estas tutsama — krei mondon kaj verki kanton. Sed ni ne mortas. Aŭ...

— Aŭ? — la elfo ektremis tutkorpe.

— Vi mortos, mortos, — malica flustro de Koŝmaro ree plenigis la aeron per io malhela, knara, frida.

La elfo kaj la kverko eksilentis. Kial oni komprenu la mondon, se en ĝi frue aŭ malfrue oni malaperu? Preferinde ni nin kaŝu, trankviliĝu kaj kredu, ke la obskura, neevitebla kunulino de Koŝmaro preteros nin.

— Diru, homo, — la kverko ĉirkaŭprenis la homon per branĉoj, — kion vi havas tian, kio ebligas al vi, eta malforta estaĵo, eliri el via loĝujo tage, krei mondon, kiun vi nomas kanto, kaj ne timi morton.

— Mi timas ĉion, — kulpece ridetis la homo. — Simple mi havas esperon. Esperon je tio, ke la morto estas nur elpensajo.

Kaj la homo denove ekludis sian simplan melodion. Li estis foriranta, kaj la kverko sekvis lin per longa trista rigardo. Poste ĝi malrapide, penseme eldiris:

— Espero... Jen kiel estas nomata la homa kuraĝo. Sed ja efektive, eblas vivi nur, se esperi, ke la morto ne ekzistas... Ni ankoraŭ multon devos kompreni...

Ekmalheliĝis, en la suna lumo jam aperis ombro de la domo, ĉena balancilo. Forta kaj ĝoja estis la sonanta en aero, plena de fajro kaj tondro melodio de espero.

Poste Solel deprenis la harmonikon de la lipoj.

— Vidu, Lena, neniun vaganton devas lasi tiu plej unua en la mondo espero.

— La espero vivi eterne, ĉu?

— Preskaŭ. Vidu, ĉiu homo komponas sian melodion, kaj jen, trovinte fine bezonatan sonon, li penas reteni tiun sonon por ĉiam. Sed ja tio ne eblas. Kaj tiam homo decidas, ke preferindas ĝenerale ne komponi melodiojn, se eĉ la plej bona sono iam silentiĝos. Tio estas timo de la morto. Tiu timo, kiu ne permesis al li eliri el mallumo. Sed la espero, kiel vere diris la kverko, estas la plej granda homa kuraĝo. La kuraĝo vivi, konsciante neeviteblon de morto.

— Kiam venos aŭroro, vi foriros. Vi estas vaganto, kaj mi ne plu revidos vin. Mi povis, unue ekvidinte vin, forkuri en la domon, sed mi decidis aŭskulti vin, sciante, ke poste doloros forlasi vin. Ĉu vi parolas pri tio?

— Jes, pri tio. Nur la espero venkas la eternan timon de ĉio vivanta — la timon perdi vivon. Tial vaganto neniam devas perdi esperon. Perdu ĝin — kaj vi iĝos sklavo de Malpleno.



ĈAPITRO 4

Melodio de Kredo

Preskaŭ perdiĝis en la nova muziko la knara simpla melodio de naskiĝo, malpli laŭte aŭdiĝis en ĝi la fajro kaj varma pluvo, sonoranta en somera foliaro. En ĝi eksonis longaj aŭtunaj vesperoj kaj esperoj, kiuj ne estos efektiviĝintaj. Nun la herbaro, kovranta la teron en lummakulo, ŝajnis polva kaj malhela. Kaj ankaŭ la lumo mem, malklara, vespera, iĝis pli pensema, trista. La kverko, nun jam fortika, maljuna, kun malglata malhelora korko, staris, profunde enpensiĝinte, kvazaŭ tute forgesis tiun unuan tagon, la tagon, kiam estis kreita la mondo kaj surĉiele ridis kaj dancis la steloj. Rekte antaŭ la kverko la kampo estis disduigita per malhela fendo — ĉu profunda riverfluejo, ĉu ravino, postsekvaĵo de tertremo,

antaŭnelonge skuinta la mondon. Obtuzo frapado de falantaj ŝtonoj, despero, timo sonis en la muziko de Solel. Kaj tra ĝi apenaŭ aŭdeblis sonoro de la unua homa kanto, muziko de espero.

La elfo sidis sur ŝanceliĝanta kverkopinto. Kaj rigardis al la ruinigita tero, sin kaŝanta en nebulo, en griza ĉielo. Neniu viva estis ĉirkaŭe. Sed tiu, kiu almenaŭ unufoje aŭdis la unuan kanton de la homoj, por ĉiam ellernis esperi.

— Kial do vi ĉiam silentas kaj silentas? Maljuna knaranta arbostumpo...

La kverko ne respondis. Lasta sunradio glitis post nuboj, blanka fulmrebrilo fride lumigis la foliojn. Malica kaj morta malvarmo plenigis la aeron. Kune kun tiu malvarmo ĉiam aperas Koŝmaro. La elfo suspiris, pli firme kroĉiĝis al malsekaj branĉoj kaj ekkantetis ion. Peze, plende ekknaris la kverko. Koŝmaro ne videblis, sed nepenetrebla, senkolora malhelo leviĝis el la ravino, plektiĝis en la grizan ĉielan nebulaĵon, ĉirkaŭprenante la tutan mondon, forprenante de ĝi kolorojn, sonojn, odorojn. La kverko unufoje vidis ĝin, ankaŭ la elfo vidis ĝin unufoje. Sed ili sciis, ke foje ĝi venos. Ĝi estis Malpleno, ili tuj rekonis ĝin.

— A-a-a-a, venis, do, — peze knaris la kverko. — Ni antaŭvidis, ke vi ne sidos eterne ekster nia nova belega mondo. Ĉu nun vi ne plu timas nin, maljunulojn?

— Mi ne povas timi, ĉar la timo estas mia kreaĵo, mi sendas ĝin, ĝi malleviĝas el miaj manoj, spiras de miaj lipoj. Simple en via mondo estis tro multe da infaneco, sed mi kaj la infaneco, ve, ne kongruas. En infaneco iel speciale videblas kaj aŭdeblas la mondo, ĝiaj koloroj, sonoj, odoroj. Kaj ĉio ĉi kontraŭas min. Kaj nun via infaneco finiĝis, forpasis miraĝoj, koloroj, dancoj. Vian teron batas mia hajlo, ŝiras miaj vulkanoj, kaj mia timo plenigas viajn korojn.

La elfo grimpis sur pinton de la kverko, rigardis foren, tie, post griza nebulo, brulis fajroj. Tio estis grandaj kaj malicaj fajroj, ili forviŝadis de la tervizaĝo simplajn lignajn dometojn de homoj, etajn legomĝardenojn, lignajn idolojn, bildigantajn, iom siaspece, la elfon kaj lian kverkon. Pasis jam multaj tagoj kaj noktoj, someroj kaj vintroj, ekde kiam ĉe la homoj komenciĝis milito.

Komence ĉiuj pensis, ke tio estas nova ludo, nur iom pli kruela, ol la antaŭaj. Sed en tiu nova ludo jam malpli kaj malpli ofte sonis la fluto, muziko de espero. La antikvaj “dioj” nenion povis ŝanĝi.

— Mi vidas, ke ankaŭ vi tristas, — knaris la kverko.

— Nur iom. La homoj perdis timon de morto, sed pro tio mi mem ekloĝis en iliaj koroj. Konsentu, kiam oni ĉiutage intencas mortigi vin, kaj vi ĉiutage mortigas, nenio, krom malpleno en la koro povas vivi.

Kelkaj gutoj falis sur korkon de la maljuna kverko — ploris la elfo.

— Jen fino. Nia belega mondo nun mortos, ja la homo diris, ke la espero estas ĉio, kion li havas.

Polvonubo leviĝis ĉehorizonte kaj komencis proksimiĝi, de ĝi jen-jen disiĝis pecoj kaj falis sur la teron. Tio estis homoj, kiuj neniam plu povos timi aŭ esperi. La homoj pli kaj pli proksimiĝis, iuj kuris, penante sin savi, la aliaj — persekutis ilin. La polvonubo jelpis kaj sonoris per klingoj el nova materialo — brila ŝtalo.

— Mi ne scias pri la mondo, sed la homoj ne restos jam ĝis la hodiaŭa vespero. Mi garantias, eĉ ne unu, — sibilis Malpleno. — Dekomence ili finmortigos tiujn, kiujn ili persekutas, poste — interkverelos unu kun la alia. Kaj poste iliajn ostetojn primanĝos mia korvaro.

Kaj la homoj plu faladis kaj kuradis, kuradis kaj faladis. Unu el la forkurantoj rimarkis la kverkon kaj despere ekkriis:

— Dio de la arbo, protektu min, mi faros al vi oferon, — kaj, timigita ĝis frenezo, li kaptis je kolumo kurantan apude amikon kaj tranĉis ties gorĝon.

La elfo fermis la okulojn, kovris ilin per etaj manetoj. La kverko skuiĝis, kvazaŭ pro vento, kaj ekĝemis, deturniĝante de la sangumita korpo.

El amaso de fuĝantoj elkuris ankoraŭ unu homo. Magra, ĉifonvestita, kun brilo en okuloj, kun alia, bona brilo, en kiu ankoraŭ restis espero, restis la unua mateno de la mondo. Mallerte, pelata de la nura deziro elvivi, li grimpis sur la pinton de la kverko. Kaj kriis al siaj kunuloj:

— Haltu, turnu vin al ili, lasu armilaron.

Pala homo kun enfalintaj vangoj ordonis al siaj kunuloj subigi sin al la batoj. Li estis la gvidanto. Senfortigitaj de la pelado, la homoj obeis, armilaro sonore falis sur la teron, time malleviĝis ŝultroj. La homoj humile atendis baton. La aliaj homoj haltis pormomente, ne komprenante, kio okazas.

La eta elfo senmoviĝis. La kverko ŝirmis per branĉoj la ĉifonvestitan magran homon.

Sentante ion tre-tre bonan, Malpleno malrapide forrampadis sialoken kaj malaperis en ravino. Venis silento.

La homo ekparolis mallaŭte-mallaŭte, ja kiam ĉirkaŭe silentiĝis la krio, oni atente aŭskultos nur flustron:

— Ni staras antaŭ vi, vi detruis niajn domojn, neniigis niajn ĝardenojn. Nun ni permesas al vi mortigi nin.

— Kial? — demandis alia gvidanto, gratetante la frunton.

— Ĉar ni havas Dion. Kaj li donacas vivon kaj al ni kaj al vi senelekte. Sed la homoj iradas surtere, etaj-etaj, militas, adoras lignaĵojn. Sed li tutegale amas ĉiujn kaj pardonas. Kaj se ni lernos pardoni kaj ami, simple, kiel vi eĉ imagi ne povas, do ni, samkiel li, vivos eterne. Nur per bono kaj rezignacio ni venkos la morton. Ni pardonas vin, ni amas vin.

Ankoraŭ duo da glavoj brilis subsune, ankoraŭ duo da korpoj falis surteren, kaj la homoj senmoviĝis, kompreninte, ke la juna gvidanto ne mensogas. Eble, li simple estis frenezulo, sed io tute nova, nebla, eniris la korojn de la homoj, kvankam ne volis enkapiĝi.

Poste ili silente returniĝis kaj iris reen. Nur la juna gvidanto restis apud la kverko.

El la ravino, malrapide volviĝante, elrampis Morto.

La gvidanto returniĝis, li tremis pro laco kaj timo, sed, kolektinte la lastajn fortojn, laŭte eldiris:

— Kaj vi ne plu ekzistas.

Kaj Morto malaperis.

— Mi ne komprenas, kion li diras, sed nun la homoj estas savitaj, ĉu?— la elfo ĝoje grimpis sur sian ŝatatan branĉon.

— Jes. Ili akiris forton, multe pli grandan, ol la tuta forto de nia viva antikva mondo, sed estos tre, tre malfacile porti tiun forton. Kaj krome, eta amiko, nia tempo finiĝis, hodiaŭ estas la unua tago de la nova mondo. Kaj ni ne plu havas lokon en ĝi.

Lante estingiĝis la griza tago. La vizio malaperis.

— Ĝi estis, verŝajne, la plej granda kaj neebla miraklo, Lena. La homoj ekkredis tion, kio ne povas kaj ne devas okazi konforme al ĉiuj leĝoj de la antikva mondo. Ĝi estis vere belega. La vaganto devas gardi en si tiun frenezan deziron donaci lumon al ĉiuj, eĉ al tiuj, kiuj tion ne meritas. Eble, ĝuste ĝi estas la plej grava.

ĈAPITRO 5

Melodio de Senreviĝo

En la nova melodio de Solel sonis aŭtuna pluvo kaj mallaŭta infana ploro, sed tamen ĝi ne estis vere trista. Suna radio denove lumigis la terpeceton ĉirkaŭ la kverko.

La tago, plenkonsidere, estis la somera, ĉie videblis altaj, ĝistalie, fostetoj de epilobio, kaj super ili zumante rondflugadis vilaj burdoj kaj rebriladis subsune pezaj bronzskaraboj. La kverko silentis, kvazaŭ ĝi eĉ neniam scipovis paroli. Enfore, iom nebulkovrita, staris grandega mezepoka kastelo kun akraj turetoj. Solel svingis la manon, kaj dum kelkaj minutoj venis la nokto. Sur la tero, kiu volis forflugi, iĝis same mallume, kiel ĉirkaŭe.

Baldaŭ aŭdiĝis voĉoj, kaj kelkaj homoj kun flamantaj torĉoj venis al la kverko. La homoj surhavis skarlatajn mantelojn, kaj sur ĉies kolo pendis gemo, aspektanta kiel kruco, ornamita per rozo.

— Mi salutas vin, fratoj, — elparolis la ĉefa. Ĉiuj sin klinis unu antaŭ la alia kaj eksidis sur la teron, konservante seriozecon en vizaĝoj kaj gestoj.

— Ni kunvenis ĉi tie por ekagi, fratoj. La homoj mergiĝis en oro kaj bonstato, ili forgesis la sencon de la rozo kaj kruco, ili mallernis serĉi ĝojon en doloro kaj malfeliĉo, vanon kaj morton — en ĝojo...

Tiutempe la nokto kovris la teron definitive, la roso falis sur la teron, kaj en ĉiu guteto ekbrilis la steloj, eĉ tutaj konstelacioj. Nerimarkita de la homoj en manteloj, el la trunkokavo elsaltis la elfo. Li iom ŝanĝiĝis, la hararo sur la dorso kaj piedetoj griziĝis, la haroj surkape similiĝis al musko. La elfo pretersaltis kaj malaperis en mallumo.

— Iam ĉi tie estis la ravino, en kiu loĝis Mallumo, sed Lumo venkis ĝin, kaj la ravino malaperis, ĉu ĝi ne estas la plej granda miraklo? — daŭrigis la ĉefo.

— La mondo tre, tre ŝanĝiĝis, — raŭkis la kverko, ĝi ankoraŭ scipovis paroli, tamen la homoj ne plu aŭdis ĝin. — Eĉ la Malplenon oni nun nomas mallumo. Kaj

neniu plu scias, ke la Malpleno estas multe pli terura ol ajna mallumo. Ja ĝi enhavas nenion. Kaj en la mallumo... En la mallumo simple ĉio estas kaŝita.

— Sed ankaŭ tiun venkon ili forgesis, — la voĉo de la ĉefo iĝis pli kaj pli laŭta kaj potenca. Ilia preĝejo devas aparteni al ni. Ni regos je la nomo de la vera bono, ni forprenos de la homoj ilian falsan feliĉon, ni instruos ilin ĝoji pri sufero.

Glitinte super horizonto, de la ĉielo falis stelo.

— Sed, magistro, — nun ekparolis la plej juna. — Ja la plej granda miraklo estis tio, ke la homoj kredis sian propran bonecon, sian propran scipovon, malgraŭ ĉio, pardoni. Ĉu, forpreninte la preĝejojn aŭ seniginte la homojn de ilia eta feliĉo, ni povos redoni al ili tiun kredon?

La kverko konis tiun junulon, li ekde infaneco venadis ĉi tien, nutris birdojn, ion legadis, apogiĝinte al la varmigita de suno korko.

— Certe, ni ne havas templojn, sed tamen... Jen, ekzemple, tiu ĉi maljuna arbo povus iĝi nia templo. Ja la Dio kreis ĝin kun la sama amo, kiel la tutan mondon.

La maljuna kverko iom ridetis.

— Sed iam la homoj pensis, ke ĝuste mi kreis la mondon. Kaj mi... mi pri tio, ĝis nun, nenion scias.

Ekis silento. Tiutempe revenis la elfo. Li portis en la manoj, tenere preminte al si, la volvaĵon kun io brilanta.

— Kio estas tio? — mallaŭte demandis Lena.

— La stelo, kiu ĵus falis, — respondis Solel pormomente ĉesinte muziki.

— Ne timu, — zorgeme flustris la elfo, — ne ploru, la eta, — li alpremis la stelon pli firme. — Morgaŭ mi lasos vin en la lagon, tie estas preskaŭ same, kiel en la ĉielo, eĉ pli varme. Vi ne pereos, kvankam la homoj opinias vin grandaj sunoj, sed mi ja scias la veron! Mi vin savos, — kaj la elfo denove sin kaŝis en la trunkokavo.

— Vi parolas, kiel herezulo, — diris la magistro per trankvila voĉo de konvinkita homo. — Vi volas konservi tion, kio pereigas nian kredon, vi volas adori arbon, idolon, alivorte. Rigardu, kiel la tondro frapos tiun malnovan lignaĵon.

La magistro malrapide leviĝis kaj levis la manojn al la ĉielo. La torĉo lumigis la mincan figuron kaj belan, saĝan vizaĝon. Rompiĝis la kanto de Solel. Kaj la ĉielo respondis al la magistro — dum sekundo elkreskis la nuboj, ekstremis kaj malaperis la steloj. La tondro ŝiris

la teron, la fulmo kiel luma sago ĵetis sin al la tero kaj tranĉis pinton de la kverko. La homoj ĵetis sin al diversaj flankoj. La magistro eĉ ne moviĝis.

Denove mallaŭte eksonis la melodio de despero.

— Ĉu vi estas viva?! Viva?! — plende pepis la elfo.

— Ŝajne, ke jes. — Venta impeto ŝiris la forbrulintajn foliojn de la mortaj branĉoj. — Eble, duone.

En morta silento la magistro kondukis la homojn reen al la kastelo. Nur la plej juna ne ekmoviĝis.

— Ĉu vi ne plu estas kun ni? — informiĝis la magistro.

— Mi estas orfo. En mia vivo mi havis nur mian kredon kaj tiun maljunan kverkon, mi kreskis apud ĝiaj radikoj, — la junulo ploris. — Vi ĉion, ĉion senigis de mi. Sed mi... mi kredis.

La homoj foriris. La junulo brakumis la kverkon kaj mallaŭte ploris. La kverko ĉirkaŭprenis lin per la vivaj branĉoj.

— Sed ja vi estas viva, — subite rimarkis la junulo. — Mi aŭdas, kiel interne de vi fluas la suko. Eĉ se mi pri io seniluziiĝis, sed mi restos kun vi, mi konstruos la domon apud viaj maljunaj radikoj, ĉu vi aŭdas? Mi promesas.

— Jen, vidu, — flustris la elfo en sia arbotruo al la eta stelo. — La mondo denove iĝos la sama, kia ĝi estis,

ili rememoros, ili komprenos. Ke nia kverko kaj la steloj estas vivaj, ili denove lernos aŭdi la mondon ĉirkaŭe, ili denove trovos por ni tempon. Ĉu vi aŭdas? Aŭdas?

Sed la muziko de Solel ne iĝis pli ĝoja, ĝi senkompate memorigis ĉiujn intajn senreviĝojn, igante plori. Kaj pro la larmoj iĝis pli facile spiri.

Poste Solel metis la harmonikon sur la herbaron, la vizio malaperis.

— Ĉu vi vidas? — ekparolis la vaganto. — La kredo faras la homon simila al la Dio, same saĝa kaj forta, sed fojfoje ĝi forprenas la kapablon admiri la simplan mondon, la vivon mem. Fojfoje ĝi senigas de la kapablo akcepti. Tial simplaj homoj scias raviĝi kaj disreviĝi, aliel ili ĉesus esti homoj. Tiuj antikvaj homoj, kiuj tiom amas la mondon, kiuj tiom esperas neniam ekkoni la morton.

— Kaj la vaganto devas kredi, ne senreviĝante, ĉu? — demandis Lena.

— Tute male. La vaganto devas kredi, por neniam halti, por interne ĉiam sonu la muziko, vokanta al vojo. Sed la vaganto devas ankaŭ disreviĝi. Por ke lia vojo ne estu rekta. Ja ĉio rekta pli aŭ malpli frue finiĝas.

La maljuna hundo, volviĝinte, profunde dormis sur la herbaro.

ĈAPITRO 6

Melodio de Morto

Kaj denove sunlumo ekbrilis super la tero, kiu volis forflugi. Nun estis aŭtuno, kaj la vento deŝiradis flavajn foliojn de la vivaj branĉoj de la kverko kaj metadis ilin sur la malsekan velkan herbaron, kie nun belis komforta dometo, el ĝia tubo fluis fumo. La suno estis apenaŭ videbla de post la nuboj, gutetis pluvo.

La muziko de Solel iĝis iom pli laŭta, en ĝi aŭdeblis sonoriloj kaj ies flustro, ĝi estis netolereble trista, kaj tamen en ĝi klare aŭdeblis motivo de kredo kaj ankoraŭ io grandega, kiel la vivo mem. Ĝi estis melodio de Morto.

De ie elkuris la elfo, li portegis subbrake kelkajn ĵurnalojn kaj konstante stumblis kontraŭ ili.

— Hej, maljunulo, — la elfo komforte lokiĝis inter radikoj de la kverko, — rigardu, kion oni skribas pri ni! Ĉu vi memoras la homon, kiu ludis fifron, tiun, kiu asertis, ke li konas la mondon? Do jen, ili skribas, ke li estis simio!

— Ili, samkiel ni, penas kompreni la mondon, simple — siamaniere, — la voĉo de la kverko estis jam tute oldula kaj knara.

— Nu, jes! Kaj jen ankoraŭ: “Morgaŭ estas Novjaro laŭ antikva stilo, la tago, kiam diablaro ekas siajn inferajn ludojn kaj malfermiĝas abismo de eterneco”. Estas mi kaj vi, oldulo, diablaro, — la elfo ridetis. — Kaj ankoraŭ du paĝoj pri ĉiuj koŝmaroj de la abismo de eterneco. Ĉu vi memoras la unuan tagon de la mondo? Verŝajne, ĝuste tra tiu pordego ni tiam babiladis kun steloj kaj demandadis unu la alian, kio estas la mondo.

La kverko svingis per branĉoj, kaj sur la teron falis tuta pluvo da novaj brilaj glanoj.

— Kaj iliaj infanetoj, — diris la kverko, — povas krei la tutan mondon — dometojn, bestetojn — el miaj glanoj. La mondo iĝis nek pli bona, nek pli malbona. La mondo ĝenerale povas iĝi nek pli bona, nek pli malbona.

Knaris la pordo de la dometo, kaj surperone aperis juna virino en leĝera hejma robo. Ŝi metis la manon al la frunto, por ne blindigu la suno, kaj longe rigardis foren.

— Li devus reveni antaŭ du horoj... — kaj ŝi revenis en la domon. Solel svingis permane, iom akcelante la tempon. Malheliĝis. La virino denove eliris surperonen kaj ĉirkaŭrigardis.

— Nun mi komprenis, — diris ŝi. — Li ne plu amas min kaj neniam plu venos, — kaj same senŝue kaj en somera robeto ŝi ekkuris ien laŭ glaciigintaj flakoj.

Porsekunde la vizio dissolviĝis, poste eklumis denove. Pli forte sonis melodio de Morto. Falis neĝo kaj preskaŭ kovris la teron kaj sekajn brunajn foliojn. Solel montris al la domo, kaj la muroj dissolviĝis, por ke Lena povu vidi ĉion, okazantan interne.

Kaj interne arde brulis kameno, post la kameno sidis Koŝmaro. De la nigraj kojnodentoj gutadis salivo kaj kiel glacipecetoj faladis planken. La virino kuŝis surlite, tute pala. Tiu, kiun ŝi atendis tiuvespere, iradis tien-reen en la ĉambro, sidiĝis, denove saltleviĝis kaj iradis tien-reen.

— KREDU, bonvolu kredi, mi vere ne povis veni tiam, ne povis. KREDU, — li ripetadis tiujn vortojn pli kaj pli, la samajn, li tre volis, ke ŝi ekaŭdu.

— Donu al mi la manon, mi frostas, — subite diris ŝi.

Li sidiĝis apude kaj prenis ŝian manon.

— Ĉu vi ne vidas, ke mi al vi kredas? Kaj tiam kredis, nur ektimis. Mi simple kredas... Je via amo.

Kaj ŝi fermis la okulojn. Koŝmaro malrapide forvaporiĝis kun terura malkontento. La junulo ankoraŭ longe sidis silente sur la lito, antaŭ ol li komprenis, ke lia edzino mortis.

Poste li komprenis tion kaj ekis paroli kun si mem, por ke ne estu tiel netolereble solece:

— Disinjoro, mi ankoraŭ tiom multe devus diri al ŝi, mi havis tempon, sed mi ne kapablis, kiam do nun, kiam? Kiel mi restos sen vi?

Malrapide relokiĝis la muroj. La kverko ekfrostis kaj ekstremis, forŝutante neĝon de la branĉoj. La elfo, kiu tuttempe sidis sur la fenestra breto, viŝis per la maneto la okulojn kaj laŭte purigis la nazon.

— Maljunulo, sed kial Koŝmaro malaperis?

— Ĉar ŝi estis ridetanta. Sed rideti — ankaŭ tio estas kredo, tia, kiun ni ne povas kompreni. Por la homoj, kiuj scipovas esti feliĉaj, ne ekzistas morto. Ja en la feliĉo ne estas loko por malpleno.

— Se la morto ne ekzistas, do kial ĝi ekzistas? —
plende ploretis la elfo.

— Por kompreni, ke io ne ekzistas, necesas, ke ĝi
ekzistu, komprenu. Alie ni tute ne eksciis pri ĝi.

Kaj lante venis la vespero.

— Tiu ĉi estas la fino de via historio, ĉu? — demandis
Lena.

— Tute ne. Memoru nur, ke por la vaganto la morto
kaj ekzistas, kaj — ne. Sed por ajna okazo bezonatas, ke
ĉiam estu tio, pri kio oni devas sincere rideti.

ĈAPITRO 7

Melodio de Amo

La pluveroj sur la herbaro jam sekiĝis, sed la floroj ankoraŭ eligis la noktan, misteran aromon. Lena eksidis pli proksimen al la maljuna hundo, kaj ŝiaj manoj dronis en la longa hararo. Estis venanta la plej malvarma antaŭaŭrora horo, sed apud la hundo estis varme.

Solel ree ekludis: la nova melodio estis mola, kvazaŭ bruo de arbo, kvazaŭ la muziko de la malfermiĝantaj petaloj, sed en ĝi estis ankaŭ io sonora, rapida, pasia.

La suna lumo vicfoje inundis la teron, kiu volis forflugi. La kverko staris same, neniom ŝanĝiĝinte, ĝi aŭskultis la venton kaj lante takte levadis kaj mallevadis la pezajn branĉojn. La dometo estis sama, nur flave farbita, brila, zorgita, sur la fenestrobretoj staris florpotoj,

kaj el la forno ne plu eliĝis fumo, la forno vivis nur por belo, kaj en la domo ekloĝis nova estaĵo. La homoj nomis ĝin elektro, sed ĝi tro orgojlis kaj parolis nek kun la kverko, nek kun la elfo. Sed eble ĝi entute ne scipovis paroli. Super la domo malrapide rotaciis tri arĝente brilaj ventmueliloj, ĝuste ili produktis elektron. La kastelo ĉehorizonte transformiĝis je ordinara urbeto.

— Mi ja ĉiam pensadas, oldulo, — la elfo desaltis surteren kaj etendis siajn membrojn, — se ili scias ĉion saman, kion scias ni, kiel ili povas jen tiel trankvile vivi? Kiel ili povas kunigi la ĝojan kaj pasian esperon kun la trankvila bonkora kaj forta kredo? Nian mondon kaj la mondon de la bona Dio? Kiel ili povas, konante la morton, geedziĝi, naski infanojn, krei pentraĵojn? Kiel ili povas krei ion? Sciante, ke pasos la tempo kaj ili ne plu ekzistos?

— Mi havas unu supozon, — kaj la vento etendis al la elfo unu el la branĉoj. — Ĝin ornamis la eltranĉita surskribo: “Mi simple kredas... Je via amo”. — Ili havas amon, kaj kiam ĝi venas, la homoj iĝas tutsamaj, kiel ni, kiam ni estis kreantaj la mondon, kiam ni ankoraŭ ne sciis, ke ekzistas Malpleno, sed male, bonege komprenis, kion kaj kiucele ni kreas. Komprenu, kiam ili enamiĝas,

ili forgesas, ke io okazas dolore, terure, peze... T-s-s...
Jen ili, ili venas.

— Kia diferenco, ja ili jam delonge nin ne aŭdas.

— Ne, ili estas geamantoj, ili aŭdas.

Kaj ambaŭ silentiĝis.

La duopo venis al la kverko kaj eksidis apude. Ŝi tenis en la manoj bukedon da epilobioj. Ili plu rigardis unu la alian kaj silentis.

— Ili konas tiun, nian mondon, ĉu? — flustre demandis la elfo.

— Jes. Ili havas pasion de fajro, teneron de akvo, kareson de vento.

— Sed ĉu la novan mondon ili havas?

— Jes. Ili scipovas pardoni, kompreni, toleri.

— Solel, — Lena tiris la vaganton je la maniko. — Kial la geamantoj silentas?

— Simple ili ne bezonas vortojn, ili sen tio komprenas unu la alian. Sed se vi volas, mi faros iliajn neaŭdeblajn vortojn kompreneblaj kaj aŭdeblaj por vi.

Lena kapjesis, kaj Solel ree ekludis.

— Aŭdu, — la knabino prenis la junulon je la mano, — sed kial vi scias, ke vi amas min?

— Mi simple scias.

— Simple, mia avo tre amis unu virinon, sed foje ŝi kuris por serĉi lin, estis jam aŭtuno, sed ŝi forgesis vesti sin, frostumis kaj mortis. Kaj li opiniis, ke li amas ŝin. Sed poste li ekamis la avinon. Do, li eraris, ĉu?

— Ankaŭ mi iam pensis, ke mi amas. Al mi ŝajnis, ke mi havas grizan, enuan vivon, samkiel ŝajnas al ajna adoleskanto. Kaj kiam mi decidis, ke mi enamiĝis, mi ekfantaziis. Mi verkis novelojn, la tuta mondo de fantaziaj kasteloj, drakoj, ŝipoj kaj nuboj estis la mia. Sed interne io demandadis min: “Sed ĉu vi povos morti por ŝi? Sed ĉu vi pretas pardoni al ŝi, se ŝi eraros? Sed ĉu vi fidelos al ŝi ĉiam-ĉiam?” Kaj mi respondadis al tiu io: “Certe, jes!”

— Sed ĉu tio ne estas amo? — demandis la knabino.

— Ne. Poste la fabela mondo paliĝis, mi sidis hejme en la urbo, kraketis olea varmigilo, sed mi ŝajnis al mi terure soleca kaj pensis, ke ĝuste tiel devas esti, ke mi simple komprenis la mondon.

La kverko kaj la elfo silente ridetis.

— Kaj poste mi rememoris pri vi, ni jam estis konataj. Kaj la polvo surplanke subite ekŝajnis ora, rebrilis fenestrovitroj, ekvivis kaj ekmoviĝis floroj en la

potoj. En mi ne naskiĝis nova fabela mondo, sed tiu, mia mondo subite iĝis fabela. Tio estis amo. Kaj ĉu vi scias?

— Kion? — la knabino levis mirigitajn okulojn.

— Ŝi pri nenio demandis.

Ili ankoraŭ pri io parolis, nun jam en nur por ili komprenebla lingvo, poste li zorgeme metis ŝin sur la herbaron kaj ekkuŝis apude.

La nokto ĉirkaŭ Lena kaj Solel malleviĝis super la geamantoj kaj ŝirmis ilin de fremdaj okuloj. Iom pli rapida kaj hela iĝis la muziko de Solel.

Lumigita restis nur la kverko.

— Vidu, — diris ĝi, — mi, ŝajne, komprenis, kial la mondo ekzistos, dum estas amo.

— Mi ja diris, — saltetante jubilis la elfo. — Kaj vi diradis, ke tio estas stulta romantiko.

— Simple, mi komprenis la kaŭzon: kiam ili amas, ili forgesas ĉion, kion iam komprenis, ili kvazaŭ denove naskiĝas, samkiel ni, aŭskultante stelojn, kreas nian etan mondon, ankoraŭ ne sciante, ke ĝin kaŝe penetros Malpleno, ke la kredo, espero, vivo kaj morto interbatalos en ĝi... Ĉu vi komprenas?

Printempo kaj gutetado sonis en la muziko de Solel. Ĉiutage ies mondo naskiĝis denove, ĉiutage en tiu aŭ alia parto de la terглоbo venadis la printempo.

— “Tio estis amo... Kaj ŝi pri nenio demandis”, — penseme ripetis Lena. — Solel, ĉu la vaganto povas ami?

Por kelkaj sekundoj ĉirkaŭe iĝis tute silente.

— Mi ne scias, — respondis Solel finfine. Kaj tiusekunde nesciate de kie aperinta sunradieto karesis la rufajn harojn de Lena.

ĈAPITRO 8

Melodio de Memoro

Estis tuttute mallume, nur someraj steloj trembrilis sur velura ĉielo. Lena sentis sin tute feliĉa, kaj la okuloj poiom fermiĝetis.

— Restis tute nemulte, — kuraĝigis ŝin Solel. — Nun vi scias, kiom multe okazis sur tiu ĉi tero. Nun vi komprenas, kial ĝi tiel volas forflugi.

Plende knaretis pro ventoblovo la aloj de mueliloj, kaj tiu knarado aliĝis la jam komenciĝintan, lastan melodion. En ĝi aŭdiĝis susuro de la falantaj folioj kaj iu ĝisdolore konata malnova kanto.

Denove ekbrilis la suna lumo, tre varma, rufa, antaŭvespera. Ĉio estis sama, kiel nun, kvankam en la

dometo ankoraŭ loĝis homoj, sed la ventaj mueliloj jam rustiĝis kaj knaris pro blovo. Sur kverka branĉo ŝanceliĝis balancilo, en la kampo kreskis ora sekalo, jam matura. En la sekala kampo kuradis knabineto en velura robeto, kaj post ŝi, amuze stumblante, kuregis pufa hundido kun tre longa hararo.

— Ja tio... — Mire flustris Lena. — Ja tio...

— Estas vi kaj via hundo. Vi ja ne pensis, ke la tero, kiu volis forflugi, tiel simple vokas vin, tiel simple volas rakonti al vi ion...

— Hej! — Iu vokis la knabinon. Ŝi retrorigardis kaj rimarkis sur kverkobranĉoj ridindan etan estaĵon, tute grizharan.

— Kiu vi estas? — Ŝi kurioze tuŝis la elfon per unu fingreto.

— Mi estas elfo, — digne respondis tiu.

— Bonege, ĉu ni ludu?

— Mi tamen havas pli seriozan aferon. Ĉu vi scipovas aŭskulti?

La knabino kapjesis kaj sidiĝis inter la spikoj, levinte per manoj lanugan hundidon.

— Jen tiu ĉi kverko estas mia antikva amiko.

— Kaj kial ĝi silentas?

— Ĝi jam multajn jarojn silentas, verŝajne, laciĝis.

— Mi bedaŭras, — ĉagreniĝis la knabino.

— Vi komprenu, ni loĝas ĉi tie de komenco de la mondo kaj ni tiom komprenis, tiom eksciis, ke nun ni volas silenti. Kaj baldaŭ ni ĝenerale malaperos, venis nia tempo.

La knabino kaptis la elfon kaj kaŝis en siaj manplatoj.

— Mi ne fordonos vin, vi estas bona.

— Atendu! — la elfo eskapis el infanaj manplatoj kaj saltis al la tero.

— Ĉu vi scias, kiam vi travivas tiom da vivoj, tiam vi komprenas, ke en la mondo la memoro estas plej grava ol ĉio. Kaj se la memoro ekzistas, tiam ĉio travivita de vi daŭras kaj daŭras. Daŭras ĉiam.

— Tio signifas, ke mi ĉiam estos knabino, kaj ĝi — hundido? — Ŝi glatumis la beston.

— Jes. Kaj ĉio, kio meritas la memoron, daŭros ĉiam. Homo eliros el sia kaverna dum la tago la unuan fojon en la vivo, senfine naskiĝos la nova, bonkora mondo, junulomonaĥo komencos konstrui ĉi tie la unuan domon... Ĉio ĉi vivos, kaj iu iam, eble, komprenos...

— Kion komprenos?

— La mondon, kiun ni kreis.

— Kaj mi konas kaj komprenas la mondon! — fiere deklaris la knabino.

La elfo ridetis kaj ekploris.

— Kion do vi?

— Aperis unu tre bona rememoro. Vi memorigis. Permesu, mi rakontos.

Kaj li rakontis al ŝi ĉion-ĉion, la tutan feliĉon kaj ĉagrenon de tiu ĉi antikva tero.

Ŝi aŭskultis, malferminte la buŝon kaj reteninte la spiron.

Lena saltleviĝis:

— Ĉu mi jam sciis ĉion ĉi? Ĉu ĉiam sciis?

Solel ne respondis.

La elfo finis la rakonton kaj denove ekploris. Li ja estis olda kaj sentimentala.

— Kion do vi? — ĉagreniĝis la knabino.

— Jen tia estis nia mondo, mondo, kiun ni vidis kaj ĉiun momenton amis. Mi volus, ke vi neniam forgesu ĝin, kiel... Nu ekzemple, kiel ne eblas forgesi la aromon de matura frago. Kaj tio same gravas, kiel ne forgesi tiun aromon. Vi komprenu, kiam vi kreskos, vi ĉion ĉi forgesos. Ĉar nur la infanoj babilas kun elfoj. Kaj vi

neniam rememoros nin. Neniam. Sed ĉu vi scias, — li ĉagrene kroĉiĝis al flanketo de la velura robo. Mi ĉiam-ĉiam vokos vin. Vokos. Mi ĵuras. Kaj vi ne ekaŭdos...

La lasta vizio malaperis. Lena ploris, sufokiĝante per la larmoj kaj sentis sin tute feliĉa. Grincis aloj de ventumiloj, bruis malvarmeta antaŭmatena vento.

— Mi ja nun neniam forgesos, ĉu vere?

— Nun neniam.

— Kaj ĉu la vaganto memoras ĉion, kion li vidis?

— Ĉion gravan, kion indas memori. Nur sciu, ke aromo de frago, pri kiu diris la elfo, eĉ simpla printempa pluvo, tia, kia estis hieraŭ vespere, povas esti pli grava ol la tuta epoko.

— Vaganto... Kaj ja de ie vi memoras ĉion pri tiu ĉi tero. Ĉu ankaŭ vi estis ĉi tie?

— Jes.

— Ĉu eĉ kiam naskiĝis la mondo?

— Jes.

— Kial mi neniam vidis vin?

— Vidis, ĉiun fojon. Vi simple tre kutimiĝis min vidi, kaj ĉesis rimarki.

Ili iom silentis.

— Mi havas ankoraŭ nur unu demandon. Diru, ĉu ili ĝenerale ne komprenis la mondon? Ĉu ĝis nun ne trovis ĝian sencon?

— Kompreneble, ne, — ekridetis Solel. — Ja se la mondo havos la sencon, por kio bezonatus naskiĝo, espero, kredo, admiro, morto, amo, memoro. Tiam ni ĉiuj ĉesus esti vagantoj.

Epilogo

Lena, ridante kaj glutante la larmojn, rigardas al tia simpla, konata de la infaneco malnova domo kun la rompita tegmento, al la kverko, kiun iam batis la fulmo, al la balancilo kaj furioze turniĝantaj aloj de ventumiloj. Nun neniu scias ilian historion, same simplan kaj same profundan, kiel la historio de tiu ĉi mondo.

Longe ankoraŭ super la tero pendis silento, diluata de komforta mallaŭta knaro de mueliloj kaj balancilo.

Poste Solel ekludis. Dekomence la melodio sonis kiel bato de la koro en la brusto, jen pli laŭte, pli rapide, pli kruele turniĝis la mueliloj, jen pli forte disŝiris la vento malhel-verdan ĉizitan kronon de la kverko. Kaj jen jam, kunplektiĝinte en la unuon, ĉiuj ĉi sonoj transformiĝis en la melodion. En la melodion de la feliĉo, en la melodion de antaŭvido de la senfina vojo.

Solel ekstaras kaj donas signon ekstari al Lena kaj la hundo, tiu spiras jam tro malfacile kaj apenaŭ povas lami post sia mastrino kaj la vaganto. Ĉiuj tri deiras al la varma mallumo de somera sekala kampo. Poste Solel levas la manon, kaj rufa lumo, kiel ankaŭ la akvo, kuniĝas en la fluetojn kaj riveretojn, fluas de la tegmento, folioj kaj flugiloj de mueliloj, kuniĝas la tuta sur falangoj de la fingroj de sia mastro. Tiam li direktas la manon malsupren, kaj rapida, blindiganta la okulojn, enpreninta en sin la tutan sunan lumon linio falas al la herbo, ĉirkaŭante la teron, kiu tiel volis forflugi.

La linio brilas pli hele, al ĝi jam estas netolereble rigardi. Lena staras, strikte tenante per tremantaj pro antaŭmatena malvarmo fingroj la densan hararon de la hundo.

En nia vivo ekzistas la minutoj, kiam ni devas akcepti tre gravan, povas esti, la plej gravan en nia vivo, la plej gravan en la historio de la mondo decidon. Kaj plej strangas, ke ĝuste tiun ĉi decidon devas fari ni mem kaj neniu povas helpi nin. Ĉu paŝi al ĉirkaŭigita per la fajro insulo aŭ resti? Sed Lena jam ne timas, sian decidon ŝi faris, kiam eksilentis buŝharmoniko. Ŝi faras la paŝon malantaŭen, en la florantan kampon, en la mallumon,

kaj ridetas, eĉ ne sciante, ke ŝia rideto memorigas nun la rideton de Solel, en ĝi brilas la rufa lumo kaj simpla, infana, natura volo vivi. Simple vivi. La hundo, kun tipa por la hundoj sentemo, komprenas ĉion. Ĝi lekas manon de Lena, la lastan fojon, kaj kolektinte la lastajn fortojn, lamante foriras, iras antaŭen, trapaŝas la linion, apartigantan du homojn de la tero, kiu volis forflugi. Poste ĝi volviĝas apud la kverko kaj ekdormas.

La elekto estis farita, la tempo venis. Solel prenas la buŝharmonikon al la lipoj. En ĝia muziko, pleniginta, ŝajne, la tutan teron, sonas la maraj ondoj, montaraj akvofaloj, sonoriloj, printempa kantado de najtingaloj, fulmotondro, kaj disŝiranta la mondon, neeltenebla, fiera feliĉo. Turniĝas rustaj ventmueliloj. Sub linio de la lumo brulas la herbo, la tero, kiu volis forflugi, transformiĝas je insulo, kaj lumigita de malsupre per la rufa lumo, ĝi supreniĝas, la pezaj, miksitaj radikoj de la kverko elŝiras pecojn de la malseka tero, forportante ilin kun si.

Nun la ora lumo estas jam ĉie, fluas kune kun la melodio, kunplektiĝas kun ĝi, kaj naskitaj de ĝi floroj kovras nigran malplenan teron, sur tiu ĉi loko, kie estis la insulo, la alia tero, kiu jam forflugis, kiu travivis jam ĉion, kion indas en tiu ĉi mondo travivi, kaj nun malaperis

post la nuboj. Akompaninte ĝin per la rigardo la lastan fojon, Lena returniĝas serĉante Solel, sed tiu jam estas malproksime, iras jen rekte kaj rekte, duonkorpe droninte en la sekalo kaj ludas nun tre simplan, grincan kaj nelertan, la plej belegan en la mondo melodion de la vivo. Kaj jen la horizonto jam ŝirmas lin per la antaŭmatena nebulo, kaj en tiu ĉi sekundo, kiam li malaperas el la vido, en tiu ĉi loko, kie li malaperas, kiel granda festo de la vivo ekbrilas la suno.

**Viaj komentoj kaj recenzoj estas bonvenaj
en gasta libro de retejo www.fabelo.trovu.com,
aŭ skribu al e-poŝto retumanto@gmail.com**

Литературно-художественное издание

**Шевченко Дмитрий Александрович
Стриганова Анна Олеговна
ЗЕМЛЯ, КОТОРАЯ ХОТЕЛА УЛЕТЕТЬ**
Сказочная повесть

На языке эсперанто

Издательство «Импэто», Москва, 117593, Литовский б-р 13/12.
E-mail: impeto@impeto.ru; WebSite: www.impeto.trovu.com

ISBN 978-5-7161-0197-5



9 785716 101975 >